

# STEFANO 178

**El la enhavo:**  
Fortuno 2000  
Kampanjo 2000  
50-a IKUE-kongreso  
Kiel al Montpelier  
Moravia-silezia renkonto  
ĈEA ĉe Interreto  
Festivalo en Ústí



## ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



RENKONTIĜO EN PREROV 25.10.1997

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio  
aperas 6-foje jare. Abono 16 gld.

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio,  
800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por  
duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla  
reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30%  
rabato.

**Membrokategorioj:** A 160 Kč, B 80 Kč, (C  
nuligita), D 40 Kč, E 40 Kč, F 3200 Kč, G  
100 Kč (Starto), N 20 Kč, eksterlandanoj 20  
ECU, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** 335 Kč komencantoj,  
240 Kč progresintoj. Aliĝoj: Blanka Gruntová,  
Vítězná 95, 784 01 Červenka-Litovel

**Libroservo:** Zdeněk Pluhař, Lamačova  
658/6, 152 00 Praha, tel. 02/5817732

**Sekcioj de ĈEA:** infana, junulara, skolta,  
pedagogia, katolika, kristana, blindula, medicina,  
scienc-teknika, fervojista, ŝakista, SAT-  
amikara, de esperantaj-kolektantoj

**Komisionoj de ĈEA:** gazetara-informa,  
ekzamena

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio,  
poŝtkesio 1069, 111 21 Praha 1, Ĉeĥio

**Internet:** cea@tmet.cz

**IĈO de ĈEA:** 00 44 30 34

**Banko-konto de ĈEA:** 3330-021/0100,  
Komerční banka, Praha 2

**Komitato de ĈEA:**

**Prezidanto:** Vlastimil Kočvara, Ant. Sovy 10,  
747 05 Opava

**Vicprezidanto:** Petr Chrdle, Anglická 878,  
252 29 Dobříchovice, tel. 02.9912201, fakso  
02.9912126

**Vicprezidanto:** Věra Podhradská, Poříčí 1, 603  
00 Brno, tel. 05/4323 3047

**Sekretario:** Květa Hubnová, Esperanto. p.s.  
1069, 111 21 Praha 1

**Komitatano:** Blanka Gruntová, Vítězná 95,  
784 01 Červenka-Litovel

**Komitatano:** Vladislav Hasala, A. Dvořákova 1,  
696 62 Strážnice, distr. Hodonín, tel. 0631/332  
278, fakso 0631/332 507

**Komitatano:** Zdeněk Heiser, Na Nábřeží  
45/25, 736 01 Havířov, tel. 069/6815253

**Kontrolgrupo de ĈEA:** Jana Holcová,

Sportovní 2723, 276 01 Mělník (membroj:  
Josef Hron, Libuše Krejčí)

**Kontisto:** Jiří Patera, U Ryšánky 1534, 147  
00 Praha, tel: 02.460162

**Ĉefdelegito de UEA:** Stanislava Chrdlová,  
Anglická 878, 252 29 Dobříchovice, tel.  
02.9912201, fakso 02.9912126

**Redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 05/4724  
0690

## Variabilní symboly pro platby Českému esperantskému svazu

311 expedice, úhrada koupěných knih a  
materiálu

604.2 písemné kurzy

604.3 předplatné Starto

604.5 předplatné Internacia Fervojisto

668 dary svazu

668.1 dividendy

694 členské příspěvky ČES

694.1 členské příspěvky UEA

789.1 sekce mládeže

789.10 sekce šachistů

789.11 sekce sběratelů

789.15 ediční fond, Ringo

789.16 subkonta klubů mimo výše uvedených

789.3 sekce železničářů

789.30 Klub Praha

789.31 Klub Přerov

789.32 Klub Poděbrady

789.33 Klub Ostrava-Vitkovice

789.7 sekce pedagogů

789.71 členské příspěvky ILEI (jsou zároveň  
předplatným pro Internacia Pedagogia Revuo)

Variabilní symbol uvádějte na přední straně  
poštovní poukázky, zároveň na zadní stranu do  
„Zprávy pro příjemce“ napište účel platby.  
Upozornění pro majitele účtů u jiných bank!  
Pokud platíte z účtu u jiné banky, uvádějte  
nejdříve svoje jméno a bydliště, např. NOVÁK  
PŘÍBRAM nebo PROCHÁZKA OLOMOUC  
apod. Zároveň uveďte i variabilní symbol.  
Dojde-li platba s označením „ČESKÝ  
ESPERANTSKÝ SVAZ“, pak vůbec nevíme  
kdo a proč platí. Takové úhrady účtujeme jako  
dary svazu.

## Fórum 2000

Laŭ iniciato de la ĉeĥa prezidento Václav Havel kaj la franca verkisto Elie Wiesel, kiuj invitis al Prago ĉ. 60 elstarajn personecojn el la tuta mondo, realiĝis konferenco (3-6.9.1997), kies celo estis kompleksa pritrakto de aktuala stato de la monda civilizo sur la sojlo de la 3a miljaro kaj prijuĝo de la fatalaj danĝeroj minacantaj nin ĉiujn.

La tritaga konferenco okazis en la impona Hispana salonego de la praga burgo Hradčany, kie estis "ronda tablo", ĉirkaŭ ĝi sidis la oficialaj gastoj kaj malantaŭ ili sidis ni, invititaj ĉeĥaj gastoj el la ĉeĥaj universitatoj kaj aliaj institucioj.

La oficialaj eksterlandaj gastoj estis universitataj profesoroj, diversbranĉaj esploristoj, reprezentantoj de diversaj religioj, verkistoj, estintaj ŝtatprezidentoj, politikistoj ktp. pluraj el ili posedantoj de la renoma titolo Nobel-premiito.

### Kelkaj opinioj de la prelegintoj:

**Václav Havel:** la konferenco **retlektu la homan fieron** - fieron de novtempa homo, kiu opinias, ke li estas la sola reganto de la mondo kaj povas ĝin senlime regi laŭ sia volo. Tiu ĉi danĝera fiero havas milfojan manifestiĝon, el kiu la Ĉeĥa respubliko spertis en la lasta tempo unu konkretan formon - la julian detruan inundon, kiu trafis grandan

parton de nia lando, speciale la moravian teritorion, sed kiu ne bezonus esti tiel katastrofa, se la homo ne mistraktus la naturon.

**Elie Wiesel,** portanto de la Pac-Nobel-premio: la konferenco *Forum 2000* servu al tiu celo, ke la venonta jarcento **evitu tenton ripeti erarojn,** kiujn la homaro nun praktikas.

**Jobei Sasakawa,** prezidanto de la fonduso *Nippon Foundation:* necesas **transportigo de la kulturaj diferencoj** inter homoj, absorbi kaj toleri diferencojn, akcepti principojn de la estimo kaj humileco.

**Dalajlama,** ĉefa religia reprezentanto de la tibetia budhismo, vestita en la tradicia flava-ruĝa vesto: **afableco estas espero,** pere de la eduko al kunsento kaj afableco en la familio kaj pere de la sekvanta klerigo en lernejoj eblas atingi estontecon plenan je espero. La plenumiĝo dependas de nia decidemo, por kiu necesas interna ekvilibro, interna anim-harmonio de ni mem. La homo estas la plej destruktiva kreaĵo en la mondo, sed lian agresivecon eblas bridi kaj mildigi, ĉar kompare al aliaj kreaĵoj la homo kapablas analizi realecon kaj evoluigi siajn bonajn ecojn, el kiuj precipe **zorgemo** pri la proksimuloj kaj vera kunsento estas ekvivalentoj al respekto de la homaj rajtoj.


**Kardinalo Jean-Marie Lustiger:** sen **espero** ni ne povus vivi. La nuna jar-



cento estis la plej kruela kaj la plej bela samtempe. La plej terura pro tio, ĉar la nekontrolata potenco de homo disvastigi malbonon kreskis al ne plu tolerebla amplekso. Espereble la estonteco povas esti alia. La rolo de la kristana religio estas subteni tiun ĉi esperon kaj doni forton al homo por la ĉiutaga batalo kontraŭ malbono.

**Helmut Schmidt**, estinta kanceliero de Germana Federacia Respubliko: paralele kun la *Ĉarto de Homaj Rajtoj* necesas akceptigi fare de Unuiĝintaj Nacioj la *Ĉarton de Homa Respondeco*. La proponon de tiu ĉi ĉarto preparis 26 estintaj politikistoj, inkluzive la usonan eksprezidenton **James Carter** kaj la israelan ekspremieron **Simon Peréz**. Unu el la ĉapitroj ekzemple postulas: „Ĉiuj homoj respondecas por la daŭre konservebla evoluo de la mondo.“

**Sergej Kovaljov**, estinta disidentulo kaj nuna membro de la rusa DUMA: nece-



sas formi tutmondan registaron, tutmondan parlamenton, ĝeneralan juĝan korton kaj mondan armeon por atingi per forto respekton al la homaj rajtoj kaj venki la nemoralajn agojn.

**Haris Silajđić**, estinta premiero de

Bosnio: la mondo helpu konservi la multetnan kaj multreligian Bosnion, kie vivas kristanoj katolikaj kaj ortodoksaj kaj islamanoj. Bosnio ne fariĝu „nigra paĝo“ en la historia libro de la homaro.

**Thor Hayerdahl**, fame konata oceanologo kaj esploristo, aŭtoro de libro *KonTiki* priskribanta lian navigadon per floso de la sudamerikaj bordoj al la Paska insulo en la Pacifka oceano, 70-jara simpatia kaj energion disradiana homo: ni defendu la naturon kontraŭ agresivaj homaj planoj.

**Simon Perez**, estinta premiero de Israelo, ministro de eksterlando kaj Nobel-premiito: la nuntempaj politikistoj transiru de la politika traktado de la mondo al la ekonomia pritrakto, ĉar politiko plejparte gvidas al la klopodo sin mem glorigi, dume ekonomio montras kiel satigi la homojn.

**Wole Soyinka**, verkisto el Nigerio, vivanta en Usono kiel ekzilito, la unua Afrikano, kiu ricevis Nobelpremion por literaturo: La mondo ne estas libera, se ekzistas eĉ nur unu loko, kie la homoj estas sklavigitaj. Ni bezonas novan mondvizion, kiu proklamos ĉiun ajn diktaturon krimo.

### Multreligia renkontiĝo

Tre kortuŝan kuneston ni travivis en la monumenta katedralo de sankta Vito. Pri la respondeco de nuntempaj religioj sinsekve parolis **Rabbi Albert Friedlander** el la Sinagogo en Westminster (Londono), **Reverend Jonas Jonson**, episkopo de protestanta religio en Svedio, **Profesoro Mohammed Amine Smaili** el la Universitato de Rabat (Maroko) kaj **Dalai Lama**, la plej alta

rerezentanto de la tibetia Budhismo, nuntempe vivanta en Indio. Ili ĉiuj enkonduke prezentis fragmentojn el siaj religiaj sanktaj tekstoj kaj poste meditis super ilia enhavo. Montriĝis, ke la prezentitaj sanktaj tekstoj kaj meditoj estas tre similaj koncerne la plej esencajn principojn rilate la interhoman kunekzistadon sur nia planedo. Necesas substreki, ke komuna kunesto de altaj reprezentantoj de mondaj religioj sur unu loko, en katedralo apartenanta nur alunu religio, estas io ĝis nun ne spertita kaj eble modelo por la estonto.

La sesdekdu-jara Dalajlama rikoltis kiel la sola spontanee aplaŭdon de la ĉeestintoj por siaj vortoj, kies senco estis: **La moralan renesancon devas ĉiu komenci ĉe si mem.** Unue estas necese zorgi pri sia propra koro, konstrui kaj flegi en si la „pacon de la animo“.

### La lingva demando:

La parolintoj plej parte uzis la anglan lingvon. Sed ni pripensu jenan fakton: homoj, invitatitaj de prezidento Havel al la konferenco, migras konstante tra la mondo kaj partoprenis jam certe dekojn da similaj konferencoj kaj pro tio ili estas spertaj pri la angla lingvo. Tamen, ekzemple Dalajlama, sed ne nur li, petis indulgon, ke li ne parolas perfekte la lingvon.

Kelkaj prelegintoj uzis sian nacian lingvon, la germanan kaj la francan. Speciale ĉe la france parolantaj personecoj mi vidis neesprimitan, tamen senteblian personon pri la nacia prestiĝo, kiu povus esti perdita, se la parolinto ne uzus sian nacian lingvon.

Oni disponigis al ni perfektan tradukservon kaj ni povis elekti el ses lingvaj versioj. La tradukistoj havis por sia dispono originalajn tekstojn de la prelegoj kaj preparis siajn tradukojn antaŭe. Se temis pri diskuto, estis tuj videblaj problemoj kaj iam mi aŭdis frazojn, kiuj ne havis plenan senco kaj ne korespondis al tio, kio estis dirita.

Kiam la konferenco estis fermata, anoncis Eli Wiesel al la ĉeestintoj, ke



venonta konferenco, kiu okazos denove en Praha venontjare, pritraktos ankaŭ aliajn novajn temojn, ekz. problemojn de virinoj, de junularo k.a. Li diris, ke li akceptos proponojn ankaŭ pri aliaj aktualaj temoj kaj konsideros ilian envicigon en la programon. En tiu sekundo mi kaptis ideon proponi al li temon, kiu koncernas problemojn de la homa komunikado, problemon de la universala lingvo.

*Vlastimil Novobilský*

# KAMPANJO 2000:

La ŝanĝo de la jarmilo estas rara natura fenomeno, kiun oni povas sperti nur unufoje en la vivo, sekve ĝi provokas proklamadon de diversaj propagandaj aranĝoj. Ankaŭ nia movado volas utiligi la okazon por atentigi la mondon pri nia laboro kaj pri niaj celoj. En Prago estis akceptita *Manifesto de Prago*, nun alinomita al *Manifesto de la Esperanto-movado*, sed ankaŭ aperis la unuaj skizoj pri *Kampanjo 2000*, kiun definitive aprobis UK en Adelajdo. Ni resumu la principojn de ambaŭ dokumentoj:

## Manifesto de Prago:

- 1) **Demokratia komunikado** (lingva malegaleco sekvigas komunikan malegalecon)
- 2) **Transnacia edukado** (edukado per fremda etna lingvo ligas nur al ties kulturo)
- 3) **Efika lingvoinstruado** (propedeŭtiko de Eo helpas venki malfacilecon de aliaj lingvoj)
- 4) **Plurlingveco** (fremdaj lingvoj vastigas la horizonton, almenaŭ Eo atingebblas por ĉiuj)
- 5) **Lingvaj rajtoj** (etnaj mondlingvoj malegaligas la uzantojn, Eo donas samajn rajtojn)
- 6) **Lingva diverseco** (por E-komunumo la lingva diverseco ne estas obstaklo, sed fonto de riĉeco)
- 7) **Homa emancipiĝo** (liberecoj de sinesprimado, komunikado kaj asociiĝo enkadre de la tuta homaro)

## Kampanjo 2000:

- 1) **Levi la organizan kaj idean nivelon de E-komunumo** (klerigi niajn membrojn pri Eo kaj pri modernaj teknikaj rimedoj)
- 2) **Levi la prestiĝon de la internacia lingvo** (traduki en naciajn lingvojn la plej bonajn informilojn pri Eo kaj direkti ilin al seriozaj kaj gravaj hom-grupoj, organizoj kaj institucioj)
- 3) **Influi la internacian vivon** (fakaj kaj landaj asocioj ligu kontaktojn kun siaj registaroj kaj fakaj institucioj kaj kun ekstermovadaj simpatiantaj eminentuloj)

## STRATEGIA FORUMO DE LA ESPERANTO-KOMUNUMO

Eĉ plej belan planon devas iu realigi. Tiel naskiĝis la ideo formi, okaze de la Kampanjo 2000, Strategian Forumon de la Esperanto-Komunumo. Ĝi estas nenio alia ol organo formata de ĉiuj prezidantoj de organizaĵoj kaj instancoj, kiuj okupiĝas pri Esperanto, kaj ĝiaj celoj estas:

- diskuti kaj identigi la kontribuon de diversaj organizaĵoj en la Esperanto-komunumo;
- diskuti kiamaniere la diversaj organizaĵoj povos kune fortigi nian movadon, interne kaj ekstere de la komunumo;
- identigi komunan strategion kaj konkretajn laborprogramojn ĝis la jaro 2000.

## Jubilea 50-a kongreso de IKUE

Kun devizo „Iru do kaj disĉipligu ĉiujn naciojn“ (Mat. 28, 19) okazis en la tagoj 31.8. ĝis 7.9. 1997 en la italaj urboj Romo kaj Rimini la 50-a kongreso de katolikaj esperantistoj (IKUE). La kongreson partoprenis tricent partoprenantoj el 23 landoj, inter ili pli ol kvindek ĉeĥaj kaj slovakaj IKUE-anoj.

La unua parto realiĝis en Romo kaj estis dediĉata al solena inaŭguro kaj al oficialaj solenaĵoj. La dua parto estis en Rimini kaj havis laboran kaj parte ankaŭ refreŝigan karakteron.

Dum tri intensaj tagoj en Romo ni kune pilgrimis en la lokoj de la Apostoloj, kvazaŭ por reveni al la fonto de Kristanismo, por tie refreŝiĝi kaj ĉerpi spiritan forton por nia kristana engaĝigo.

En Vatikano ni lunde vizitis Placon Sankta Petro, la ĉefverko de Bernini (1656-67), ĉirkaŭita de kvarobla dorika kolonaro (284 kolonoj kaj 88 pilastroj), kronata per 162 statuoj de sanktuloj. La kongreso estis inaŭgurata per diservo en Esperanto ĉe la katedra altaro en la Baziliko Sankta Petro - altaro de la Papo, sekve ankaŭ ĉi tiu cirkonstanco estis io eksterordinara. Kun la episkopo Locatelli kuncelebris 16 sacerdotoj-

esperantistoj.

Promenante tra historia parto de la urbo ni alvenis al monteto Kapitolo, kie en la salono „Promoteca“ okazis la inaŭgura sesio de la kongreso. La plej ampleksan paroladon havis la centra direktoro de la Vatikana radio, kiu promesis sian plenan subtenon. Inter pluraj eminentaj gastoj parolis

ankaŭ Mikela Lipari, ĝenerala sekretariino de UEA, kiu atentigis pri la Kampanjo 2000, lanĉita de UEA, en kiu gravan lokon okupas ankaŭ la agado de katolikaj esperantistoj. Nur inter ni iom ŝerce ni atentigis pri la

antikvaj anseroj de Kapitolo, kiuj, kiel malgranda grupo, kun malfortaj voĉoj, vekis la defendantojn kaj savis la urbon. Ankaŭ nia malgranda grupo, kun malfortaj voĉoj, estu aŭdata en la mondo.

Ni vizitis multajn kapelojn kaj monumentojn, admiris mirindajn mozaikojn de la altaroj, kopiantaj famajn pentraĵojn, vizitis tombon de Sankta Petro kaj de multaj papoj, sanktuloj kaj aliaj gravaj personoj en Sanktaj Vatikanaĵoj Grotoj sub la centra navo de la baziliko, inter ili tombon de nia kardinalo Josef Beran. Pli multaj supreniris ĝis supro de la kupolo,





atinganta ĝis la supro de la kruco 132,50 m, de kie oni povis spekti belegan panoramon de la tuta Vatikano kaj eterna urbo Romo.

Marde ni vizitis Amfiteatron Kolo-seon kaj Romian Forumon, sekvis vizito al Baziliko Sanktaj Johano kaj Paŭlo sur monteto Celio, kie estis por ni celebrata kantata grekkatolika sankta meso en Esperanto. Sekvis vizito al bazilikoj Sankta Paŭlo ekster la Muregoj, Sankta Johano Laterana kaj Sankta Maria la Granda, troviĝantaj sur teritorio de Romo, sed apartenantaj al Vatikano.

La kulmino de la Roma parto de la kongreso estis la merkreda aŭdienco ĉe la Papo sur la Placo Sankta Petro, kun lia kelk-minuta parolado en Esperanto. Dum tiu ĉi neforgesebla travivaĵo Johano Paŭlo la 2-a salutis la kongresanojn per jenaj vortoj:

„Mi ĝojas bonvenigi la respon-sulojn de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, engaĝitajn en sia Kvin-deka Kongreso.

Karegaj, la temo de via renkonto reprenas la misian taskon konfiditan de Kristo al sia Eklezio. Akceptu ĝin malavare kun tiu spirito de uni-versaleco, kiu estas ĉe la bazo de la lingvo, kiun vi kulturis.”

Dum la aŭdienco kongresa dele-gacio transdonis al la papo donace speciale por li blanke binditan Mes-libron en Esperanto. Post la aŭdienco ni reenbusiĝis por atingi Palacon Kviralno, kie en granda aŭdienc-salono ni ĉiuj estis akceptitaj de la

itala prezidento Oscar Luigi Scalfaro, kiu aprecis valorojn de Esperanto kiel elementon ege utilan dum unu-iĝado de Eŭropo kaj promesis subteni ĝian disvastigon.

Post la aŭdienco ni forveturis per kongresaj busoj al Rimini, kie realiĝis la labora parto de la kongreso.

Rimini estas antikva, historie riĉa urbo, situanta laŭlonge de la fame konata Eŭropa Strando, 15 km longa, kun 1550 hoteloj kaj familiaj pensi-onoj, nekalkulante 16 000 vilaojn kaj ludomojn. Pro beleco de sia mar-bordo, klimata mildeco kaj sincera



afableco de siaj loĝantoj, Rimini fariĝis ĉefurbo de la monda feriado kun miliono da turistoj somere.

Krom la akcepto ĉe la urbaj instan-coj, ni aŭskultis interesajn fak-prelegojn, partoprenis Generalan Kunvenon de IKUE kaj Publikan ceremonion en la salono Espero. Ĉiutage ni partoprenis sanktan meson en Esperanto, restis tempo ankaŭ por



ekskursoj kaj distro.

Ĵaŭde vespere ni partoprenis trihoran ŝipveturon laŭlonge de la lumigita marbordo, dum kiu ni estis regalitaj per rostitaj marfiŝoj kaj bongusta vino, sabate vespere ni en parko Briolini partoprenis Folkloran Vesperon, tipan de Regiono Romanja kun muziko, rostitaj fiŝoj kaj vino por ĉiuj.

Vendrede posttagmeze ni ekskursis per busoj al San Marino, la mal-novega tero de libereco. Ni vizitis parton de la urbo situanta sur la tripinta monto Titano, kie en la 4a jc. post Kristo ŝtonhakisto Marino el in-sulo arbe en Dalmatio fondis civiton, nun ĉefurbon de la respubliko, al kiuj apartenas ankaŭ komunumoj de Serravalle, Fiorentino, Monte Giardino kaj Faetano, nuntempe nomataj la Kasteloj.

Post promeno ni partoprenis solenan sesion en Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino, kreita en 1983 de la sanmarina registaro, kie oni post tutsemajnaj ekzamenaj disertaĵoj en Esperanto kaj en la etna lingvo de la aŭtoroj solene promociis ekzamenitojn.

Poste ni vizitis sidejon de la sanmarinaj Kapitanoj Regantoj, kie oni akceptis delegacion de IKUE. Ne ĉiuj scias, ke la du Kapitanoj Regantoj estas demokratie elektataj dufoje jare de la partioj por gvidi la Respublikon, kio pli certigas demokratiecon de la Sendependa Respubliko de la Libereco. Fine ni estis akceptitaj en Baziliko Sankta Marino

de monsinjoro Paolo Rabitti, la episkopo de Pennabilli kaj San Marino, kaj kie poste estis celebrata solena sankta meso en Esperanto.



Sed ankaŭ sabata antaŭtagmeza vizito al pilgrimloko de Dipatrino de la Mizerikordo en Rimini, kie ni partoprenis sanktan meson en Esperanto kuncelebratan de monsinjoro Giovanni Locatelli kaj postan renovigon de la Sinkonsekro de IKUE al la Senmakula Koro de Maria fariĝis neforgesebla travivaĵo por ĉiuj.

Dimanĉa antaŭtagmeza fermo de la kongreso en Salono Espero kaj komuna sankta meso en la paroĥa preĝejo de Sanktaj Johano kaj Paŭlo, prizorgata fare de esperantista paroĥestro Duilio Magnani, post rekonstruo en 1994 probable la unua preĝejo en Eŭropo kun ĉiuj surskriboj ankaŭ en Esperanto, fariĝis digna punkto post neforgesebla kongreso.

*Laŭ Jindřich Tomíšek  
kaj Jiří Laube*

## Ni nomis ŝin Cilka

kaj ofte multaj gesamideanoj ne povis rememori ŝian familian nomon - Kotyzová. Ŝi apartenis al admirindaj civitanoj de Česká Třebová, al oferemaj anoj de Esperanto-movado. Cilka reprezentis dum multaj jaroj nian lokan E-rondeton „Amikeco“ kiel prezidantino kaj multe da tempo dediĉis al instruado de Esperanto en nia urbo. Sed ŝi laboris ne nur en loka E-movado. Esperantistoj-invalidoj konatiĝis kun Cilka kiel kun unua persono de kunfondintoj de sekcio de handikapuloj. Cilka preskaŭ neniam mankis kiel favora kunorganizanto de diversaj E-renkontiĝoj, niaj E-baloj, amuzvesperoj ktp. Lastfoje ni festis kun ŝi 55 jarojn de ŝia naskiĝo, ne pensante, ke ni renkontiĝas lastfoje. Cilka subite mortis la 18-an de oktobro.

Por ĉiuj, kiuj konatiĝis kun oferema kaj bonkora Cilka, mi adiaŭas kun Cilka per vortoj: „Nia kara Cilka, ni dankas al Vi por ĉio, tre Vi mankos al ni...“

Jiří Pištora

## Roger Bernard (1907-1997)

grava persono de nia movado, forpasis la 10-an de aŭgusto 1997. Kiel kunlaborinto de Kalocsay li kontribuis al *Parnasa gvidlibro* per rimvortaro, sed sian lokon en la E-kulturo li certigis precipe per propraj tradukoj: *La naŭzo* kaj *Sen eliro* (Sartre), *La homa voĉo/La bela*

*indiferentulo* (Cocteau), *La portugalaj leteroj* (Guilleragues), *Topaze* (Pag-nol), *La ŝipego „Tenacity“* (Vildrac), *La granda Meaulnes* (Fournier), *La mizeruloj* (Hugo), *La buton-milito* (Pergaud). Unu monaton pli frue la 30-an de junio forpasis ankaŭ lia edzino.

## Sukcesa JET ripetinda 1998

En la bela pejzaĝo de la Nigra Arbaro kun ĉiam brilanta aŭgusta suno renkontiĝis pli ol 60 junuloj el naŭ landoj por sperti novan eksperimenton: ili partoprenis JUNULARAN EKUMENAN TENDARON por kanti, ludi, danci, kaj preĝi. Komuna lernado de Esperanto helpis transiri la lingvajn barojn kaj instigi al pli profunda internacia komunikado.

Pro bonaj spertoj ankaŭ venonte okazos JET: 10/16 de aŭgusto 1998

En 1998 JET okazos en la frata komunumo de Taize en centra Francio, kiu tiom multe instigis la ekumenan proceson. Ĉar lingvokursoj por komencantoj tie ne eblas, ni invitas aparte kore progresantojn por la semajno post la UK.

En la sekva jaro 1999 JET okazu enkadre de la Ekumena Kongreso en Varsovio. Petu pli detalan programon (pretigotan) de la organiza teamo:

pastro Bernhard Eishkorn

Romaeusring 20

DE - 78050

VS - Villingen

Ursula Niesert

# TRA ESPERANTA GAZETARO

**Internacia Agrikultura Esperanto-Asocio (IAEA)**, fondita en la fino de 1996, eldonas sciencan organon „Internacia Agrikulturo“ kun 20 paĝoj kaj 3-4 numeroj jare. Membro-abonkoto: 6 USD. La organo „Internacia Agrikulturo“ bezonas sciencajn artikolojn pri agrikulturo, hortikulturo, arbarkulturo, bestbredado, akvoproduktado, planta protekto, ekologio, agrikulturaĵi biologio, kemio, meteo-



logio, metioprotekto, ekonomio, edukado kaj rilataj sciencoj, eĉ kampara turismo. Nuntempe IAEA bezonas ankaŭ sciencajn manuskriptojn pri la menciitaj fakoj celante eldoni specialajn librojn. Bonvolu peti detalajn informojn kaj provkzempleron de „Internacia Agrikulturo“ kontraŭ 2 USD (enmetu monbiletojn en koverton) ĉe: sekretario kaj kasisto de IAEA, Huang Yinbao, Jingchuan Xian Kewēi, CN-744300, Gansu, Ĉinio.

**Internacia Agrikulturo 2/97** prezentas jenajn artikolojn: Berlinaj

arbaroj, La blanka polucio en agrikulturo, Kampara ekskurso, Mirakla araneo, Transgena tritiko anti-flav-nanisma, Subĉiela hidroplantado en Rusio, Entomologia Muzeo fondita, Nuklea tekniko en agrikulturo, Internacia Vortaro de Mikroba Genetiko, Kotono kun sinteza bacilo kontraŭverma, Tritika vario taŭga al sekkampo, Antisepsaj transgenaj plantoj, Seksoregado de bovoj, Sovaĝaj ĉevaloj en Ĉinio, Teni fungan freŝecon, Fiŝbredado en rizkampo.

**Israela Esperantisto 126/1997** alportas trian parton de prelego pri F. Kafka (kiun d-ro M. Nervi prezentis dum UK en Prago) kaj laŭdon pri inventemo de K. Piĉ en *Litomiŝla tombejo*. Persekutadon de judoj priskribas artikoloj *Famaj judaj virinoj en Berlino* kaj *Kaj daŭre mi vidas iliajn vizaĝon*, pri ilia emancipado *La unua vera cionisto*.

**La Brita Esperantisto 938/1997** informas pri vizito de ĉeĥaj infanoj en Painswick kaj invitas al Brita kongreso en Chester en aprilo 1998.

**Unua libro pri la eŭro en Esperanto** ĝuste forlasas presejon. Nova monero - eŭro - aperos en Eŭropo post nur 15 monatoj kaj dum tri jaroj anstataŭos plurajn el la nunaj monoj de la Eŭropa Unio. Pri la

historio, avantaĝoj kaj malavantaĝoj de la eŭropa monunuigo rakontas libro originale verkita en Esperanto „Eŭro, ecoj kaj sekvoj por ĉiuj“ (prezo 7,95 NLG), kiun eldonis Flandra Esperanto-Ligo, Rulenslaan 10, B-3020 Herent, Belgio

**Oomoto n-ro 439/1997**, gazeto el Japanio, priskribas viziton de japanaj esperantistoj dum 81-a UK en Prago 1996, plue Esperanton en Nepalo, Unuan Azian Kongreson, medio-protektadon en Japanio kaj biografion de s-ano Hidemaru, unu el fondintoj de Oomoto. Kiel ĉiam multaj fotoj.

**KAE 2/1997**, kataluna bulteno, informas pri 56-a Hispana E-kongreso en Valencio kaj pri nova libro *Monumente pri Esperanto*, kun 1044 monumentoj, stratoj kaj aliaj objektoj pri Zamenhof aŭ E-o.

**Esperanto-parto** de Urba muzeo en Česká Třebová eldonis koloran Kristnaskan bildkarton. Unu bildkarto kostas 3,-Kč, sed oni devas alkalkuli sendkoston. Bonvolu, E-klubo kaj geinteresatoj, mendi ĝin amase je adreso: Městské muzeum, Staré nám. 78, 560 02 Česká Třebová.

**ESPERANTO oktobro 1997**, organo de UEA: mondfama rusa psikologo Lev S. Vigotskij (1896-1934) sciis ĉiujn eŭropajn lingvojn inkluzive de Esperanto; G. C. Fighiera pritraktas Kampanjon 200; novaj Honoraj

Membroj de UEA estas anglo John Wells, kroato Ivo Borovečki, usonano Donald Broadribb, polino Jadwiga Gibczynska kaj finno Lusi Oterma; en nova Holivuda sciencfikcia filmo *Gattaca* eksonas ankaŭ Esperanto kelkloke; svisoj kreis filmon en Esperanto *La eta knabino*; italoj enkomputiligas siajn plej grandajn vortarojn I-E de Minnaja kaj E-I de Broccatelli por eldoni kompaktdiske; aperis la tria volumo de Tolkien *La Reveno de la Reĝo*.

**Debrecena Bulteno** estas 54-paĝa enhavoriĉa dumonata periodaĵo kun tre variaj temoj, informoj, rakontoj, humuro (jam pli ol 100 numeroj).



**Nova penso**, dulingva 12-paĝa kajero el České Budějovice, alportas ĉeĥe kaj esperante artikolon de Tomáš Pfeiffer *Ekzistado*, poemon de MUDr. Radovan Pavlík *Tagiĝo* kaj eseon de Josef Zezulka *Sistemo I* pri materio kaj spirito. Kvarpaĝa folio **Homekologio**, informas pri homaranismo, menciante ankaŭ Komenion kaj avertante antaŭ la homa maltoleremo.

## Kolektanto de Dagmaroj

Mia avineto estis vera filozofo en jupo. Kiam venis al ŝi juna edzino vivanta en apuda domo en la sama vilaĝo kaj plendis pri sia edzo, ke anstataŭ plugeti ĝardenon li dediĉas sin al kompletigado de la vilaĝ-kroniko, la avino respondis: „Ĉiu normala viro, eĉ kiam li iam estas nenormala, tamen estas normala. Ĉiu normala viro ion kolektas kaj kiam li kolektas tute nenion, li estas aŭ debile genia aŭ genie debila kaj pro tio ne taŭgas por edzeco.“ La juna najbarino poste neniam elvokis hejman militon kontraŭ sia iomete nenormala edzo, kiu nepre estis plene normala.

Kiam la edzo de mia filino iutage alvenis al mi por vira babilado, mi demandis lin, ĉu li ion kolektas - li respondis negative kaj post mia admono, ke li devus enpensiĝi pri si mem, li demandis, ĉu ion kolektas mi. Mi respondis, ke mi kolektas DAGMAR-ojn, kaj li restis sidanta kun malfermita buŝo.

Mi prezentis al li mian notkajeron kun tridek damoj de tiu antaŭnomo. La nomo min fascinis, kiam mi legis en iu libro, ke la nomo estas de skandinava deveno el la vortoj Dag-Mari (Gloria Tago). Mia kolekto komenciĝas per Dagmar, la reĝino danlanda, kaj finiĝas per Dagmar, edzino de nia prezidento.

En 1985 mia 15-jara filino, havante nenion por fari, komencis kontroli

mian skribotablon, trafis la notkajeron kaj ekpensis, ke ŝi malkaŝis nomaron de miaj amatinoj. Ŝi tuj ekmarŝis al mia edzino en piedvest-vendejon por montri kun kia bonvivanto kaj malfruiĝinta Cassanova ŝi vivas. Sed mia Dagmar al la filino diris, ke ŝiaj instruistoj devus redoni siajn salaj-rojn, ĉar ili ne lernigis ŝin eĉ legi. Nur nun la filino tralegis miajn notojn.

Vespere la edzino rakontis al mi la eventon. La rimarko pri malfruiĝinta Cassanova kaŭzis al mi malkvietan nokton, kaj tial mi matene vizitis mian iaman samklasanon, kiu fariĝis psikiatro. Li diris al mi: „Ke vi estas idioto, mi ekkonis jam antaŭ longe laŭ tio, ke vi amikiĝas kun psikiatro kaj drinkas kun li slivovicon. Tamen via idiotismo povus vin famigi, ĉar neniu alia en la mondo kolektas Dagmarojn, vi eĉ povus trudi vin en Guinnessan libron de rekordoj!“

Forfluis jaroj, mia amiko psikiatro jam forpasis, trafita de apopleksio pro ĝojo, kiam lia edzino naskis kvinan infanon, finfine filon. Mian kolektadon de Dagmaroj malhelpas mia nestabila sanstato (la 6-an de januaro 1997 oni amputis mian maldekstran kruron super la genuo), sed malgraŭ ke mi estas dumvive kondamnita al rulseĝo, mi komencis kolekti ankaŭ Karlojn.

*Antonín Bombionka*

Mi oponas al s-ano Hršel pri la problemo „ne devi“. La aŭtoro mise, laŭ mi, argumentas, i.a. per tute ne principa kriterio, nome la zamenhofeco de la uzado.

1) Ja tute ne gravas, kiajn starpunktojn havis Zamenhof, kaj kiujn alternativojn li uzadis. Mi samopiniis kun Zdeněk Hršel, ke Z. kutimis uzi neregule la verbon „ne devi“, do laŭ mi - malĝuste.

2) Bedaŭrinde eĉ en la baza, grava, oficiala verko, nome la Fundamento de Esperanto, troviĝas kazoj de neĝusta uzo (kiel Zd. Hršel bone notas, ni diru trifoje) de la esprimo „ne devi“. Kaj leganto de FdE normale havas impreson, ke la esprimoj estas uzataj „neregule“, do en senco „estas malpermesite“. Sed: tio nur laŭ la kunteksto ŝajnas al la leganto; ja alia senco ŝajnas neprobabla, eble eĉ absurda. Tamen: teorie TUTE ne estas klare, ke temas pri TIU varianto. Teorie ja povas temi eĉ pri la senco „ne estas necese“. Ja ne ekzistas ia oficiala TRADUKO de Antaŭparolo de FdE, sekve ankaŭ ne de la dubaj ties lokoj kun la „malica“ esprimo.

3) Jes, ankaŭ PIV ofte uzas „ne devi“ neregulece. Sed ja PIV ne estas oficiala afero. Ĝiaj aŭtoroj, simile

kiel Z. Hršel, estis obsedataj per ideo uzi tiun verbon neregulece.

4) Uzado malregula de la esprimo „ne devi“ en la naciaj lingvoj (rusa, angla ktp.) tute ne estas grava kaj imitinda por la analogia uzo en Esperanto. Same kiel por Esp-o ne gravas la uzo de tiu verbo ekz-e en la ĉeĥa. Cetere: Nia, en sia principo tute malregula lingvo ĉeĥa tute hazarde, escepte, en ĉi tiu punkto, havas uzon regulan = racian.

5) Mi konsentas kun s-ano Hršel, ke tiu ĉi vorto estas tro grava (kaj la neunueco uza povus kaŭzi fatalajn miskomprenojn). Sed difERENCE de la aŭtoro - mi ne vidas bonan solvon en la uzo de „ne bezoni“ anstataŭ „ne havi devon“. Mi pledas por la verbo „DARFI“, kiun uzadis ekz-e Jiří Kořínek (se mi bone



memoras). Tiu „darfi“ (kiu proksimas al „rajti“, sed ne estas tiom forta) povus bone helpi al ni kaj ofte praktike solvi, savi situacion. Do en la cititaj lokoj de Fundamento kvazaŭ (laŭ mia propono) estus skribite:

a) Neniu persono ... **darfas** havi ...

b) La FdE tute **ne darfas** esti rigardata ...

c) Ĝi **ne darfos** forigi aŭ ŝanĝi ...  
Ĉe la fino mi volas diri, ke mi

opinias malĝusta ian kvazaŭ bigotan konsideradon de la Zamenhofa uzo ia lingva normo. Same malĝusta, laŭ mi, estas troa imitado de aliaj lingvoj. Gravas nur la bazaj oficialaj principoj, normoj de Esperanto, plus reguleco, logiko, racio.

Mia noto al citaĵoj de FdE-a Antaŭparolo:

La citaĵo „c“: tie ne ŝajnas, ke nepre temas pri „estas malpermesite“. Ja ankaŭ - kaj eĉ pli! - povus temi pri „ne estas necese“. Do la tri kolonoj de la Hrŝela teorio reduktiĝas al du.

Jiří Rada

### Komento de la redaktoro:

Eĉ en la ĉeĥa lingvo ekzistas du logikoj por negacio de „devi“: *musíš zpívat, máš zpívat* = vi devas kanti, oni ordonas al vi kanti; *nemusíš zpívat* = oni permesas al vi ne kanti; *nemáš zpívat* = oni ordonas al vi ne kanti. Ne eblas objektivite decidi, ĉu pli ĝusta estas la logiko *ordoni fari - permesi ne fari*, aŭ *ordoni fari - ordoni ne fari*.

La sistemo de modaj helpverboj (*povi, devi, voli*) formas kun kopuloj (*esti, havi, iĝi*) la kernon de ĉiu lingvo. Se „ne devi“ ne havus jam la signifon de la proponata „ne darfi“, tiam al Esperanto dum la tuta jarcento mankus unu el plej bazaj esprimiloj. Kaj ni devas demandi, kiel Esperanto kaj ĝia literaturo povis transvivi tiel pezan handikapon? Kiel oni povis senti tiu signifo traduki Biblion, Faraonon, Sinjoron Tadeon, Inferon, Quo vadis?

Kial Zamenhof ne sentis la mankon kaj ne enkondukis mem la neologismon „darfi“ (aŭ alian esprimon kun tiu signifo), kial ĝin ne akceptis la Akademio? Kun „darfi“ ne kalkulas grandaj lingvistikaj verkoj de nia movado kiel Plena Vortaro, Plena Ilustrita Vortaro, Plena Gramatiko, nek la plej grandaj novaj nacilingvaj vortaroj, la rusa de Bokarev (1974), la germana de Krause (1983), la franca de Le Puil kaj Danvy (1992), la itala de Minnaja (1996). Oni ne trovas ĝin eĉ en *Kompleta Lernolibro de Regula Esperanto* de Ludoviko Mimoo Espinalto, fondinto de Analiza Skolo, kies ĉefa devizo estas reguleco kaj logiko en Esperanto. Tamen la skolo trovis nenion ne-logika aŭ neregula en la sistemo de la modaj helpverboj.

Ne estas hazardo, ke „darfistoj“ rekrutiĝas precipe el ĉeĥoj (Kilian, Kořínek, Vondroušek, Píč) - sub influo de alia patrolingvo ŝajnus al ili la Esperanta sistemo tute normala.

Por lingvo gravas ankaŭ ĝia tradicio, konservita en literaturo. Tradician kernon de la lingvo post cent jaroj da uzado ne eblas simple ŝanĝi. En Biblio estas „ne devi“ uzita 48-foje kiel malpermeso, 3-foje kiel permeso, sed 12-foje estas kiel permeso uzita „ne bezoni“.

Kiel ĉe ĉiu neologismo la uzanto de „darfi“ riskas, ke alilandaj samideanoj lin ne komprenos aŭ pensos, ke li parolas Idon, Esperantidon aŭ ian Darfidon, sed ne Esperanton.



# Informoj el la komitato de ĈEA

La kunveno planita je la fino de aŭgusto okazis en Strážnice 29.-30.8. La traktitan dosieron da taskoj komencis ekonomiaj aferoj de la asocio. Estis deklarite, ke plenumiĝis komitata devo informi la membraron pri la pasintjara mastrumado de la asocio - ĝi estis publikigita en la pasinta numero de Starto. Ioman malfruigon de la publikigo kaŭzis ĝis tiu tempo ne plene fermita libroteno de la asocia kongreso en Havířov. La fina malprofito estis pri 15 mil kronoj malpli alta ol buĝetite. Sufiĉa bonhavo permesis decidon de la komitato

aĉeti novan laseran printilon kaj disponigi ĝin al nia redaktoro Malovec, ĉar tiu nun uzata jam malmoderniĝis kaj kaŭzas oftajn problemojn en la presejo (makuloj sur papero). Estis diskutitaj ankaŭ rezultoj de la praga UKo, kiu finiĝis kun bona saldo - la rezultojn devas aprobi ankaŭ komitato de UEA.

Plue grava programero de la komitata kunsido estis aŭtuna asocia konferenco en Prago, pri kiu niaj legantoj jam ricevis detalajn informojn kune kun la aliĝilo en Starto n-ro 4. Oni atendas vastan intereson pri la konferenco, kiu

okazos omaĝe al 95-jariĝo de Praga Esperanto-Klubo. La okazon renkontiĝi eluzas ankaŭ la reaktiviganta pedagogia sekcio de ĈEA, kiu invitas lernantojn de la skribaj kursoj al paroliga seminario.

La komitato jam pli frue decidis instigi pliajn sekciojn al pli aktiva agado. Respondeca komitatano V. Hasala jam disponas per nomlistoj laŭ fakaj interesoj de niaj membroj kaj klopodos kontakti plurajn el ili. Grandan atenton la komitato dediĉis al dumferiaj movadaj eventoj: Unue al la adelajda UKo, kie

agrable ankaŭ nin surprizis la ĉeĥa ambasadoro per sia aktiva lingvoscio - detale raportis dr. P. Chrdle. Pri festeno okaze al la 45-a jubileo de SET Lančov parolis V. Podhradská kaj pri bona nivelo de la Katolika E-tendaro en Sebranice informis V. Kočvara.

La plej longan parton de la kunsido prenis diversajtoj, ĉar multaj el ili gravas por pluaj paŝoj de nia movado: La komitato akceptis financan garantion por seminario de kunlaborantoj de ĉeĥa-esperanta vortaro sub gvido de s-ano K. Kraft. La sukcesa finprodukto - la nova



moderna vortaro - realiĝos eble jam komence de la venonta jaro ankaŭ helpe de nia asocio al la eldonejo KAVA-PECH. Por la 2-a komuna ĉeĥa-germana kongreso estis jam elektita preciza dato 29.5.-1.6.1998. Ĝi okazos en Saksujo, detalojn plue traktas komitatano K. Hubnová. Ŝi informis ankaŭ pri aliĝo de nia asocio al internacia komputila reto Interreto (Internet). Ĉefdelegitino de UEA, s-ino S. Chrdlová informis pri la delegita reto en nia lando kaj pri ebleco de novelektiĝoj, ĉar venontjare finiĝos la nuna trijara funkcioperiodo. Komitato diskutis ankaŭ kelkajn dispoziciojn por flua solvado de movadaj problemoj - pri tiuj ricevos informojn ĝuste la koncernuloj. Je la fino de la aŭgusta komitatkunsido oni, kiel kutime, tuŝis multajn temojn kaj demandojn, kiujn renkontas nia asocio en sia ĉiutaga agado kaj necesas ilin respekti aŭ solvi.

Venontan kunvenon oni planis en mezo de oktobro en Prago, sed nun ni jam scias, ke ĝi estis forŝovita je malpli frua dato pro kelkaj malsanuloj inter la komitatanoj.

#### VI. Kočvara

**Intervjuon kun d-ro Hradil pri pensio Espero en Skokovy** elsendis Ĉeĥa Radio la 9-an de septembro 1997.



Kvankam oni parolis precipe pri medicinaj aferoj, ankaŭ Esperanto estis tuŝita.

**RENKONTIĜO DE MORAVIAJ KAJ SILEZIAJ ESPERANTISTOJ** okazis en Pŕerov la 25-an de oktobro 1997 omaĝe al 85-jariĝo de la klubo kunlabore kun kluboj de Prostějov kaj Olomouc. Alvenis 67 samideanoj el 21 kluboj, ankaŭ Bohemiaj, kaj du eksterlandaj (pola kaj slovakaj) gastoj. Doktoro Mohapl rakontis la kluban historion kaj rememoris la famajn Moraviajn Esperanto-Pionirojn, kiuj postlasis vicon da valoraj tradukoj. Quido Janík prezentis lumbildojn el Adelajdo. La promeno tra la urbo kulminis en muzeo de J. A. Komenio. Bedaŭrinde pro la someraj inundoj estas nun ĉiuj tranoktejoj okupitaj de personoj perdintaj sian domon, tial ĉiuj devis vespere forveturi.

#### Esperanto-Klubo Strážničan

organizas sabate la 1-an de novembro 1997 la kutiman renkontiĝon de kolektantoj de moneroj, telefonkartoj, bildkartoj, kaj aliaj kuriozaĵoj en la urba kulturdomo Strážničan. Pluajn informojn rekte ĉe: Esperanto, poŝtkesto 36, 696 62 Strážnice, tel. 0631/334 905, 334 762.

**Esperanta Ŝako**, organo de EŜLI, havas novan redaktoron post nia d-ro J. Canibal. Nun la periodaĵon redaktas Arvo Reede, EE3170, HAAPSALU, Ŭpetaja 27, Estonio.

#### Ŝtelo en SAT

Nekonatoj perfortis la pordon, eligis ĉiujn meblojn kaj arkivaĵojn arkivitaj despost la jaro 1921 ...

## Kultura festivalo en Ústí

Proksimume kvardek personoj partoprenis la 10-an Kulturatan Festivalon en Ústí nad Labem (26-28 septembro 1997) en Kulturdomo. La prelegojn startigis letero de L. Chytil pri inundoj en Moravio kaj rememoroj pri J.



Mařík (Novobilský), T. G. Masaryk (Laube), M. Lukáš (letero de Z. Hršel) kaj ĉeĥa prospektoro Čeněk Paclt (Mráz). Poste sekvis grandaj aktualaj temoj: Forumo 2000 en Prago (Novobilský), Kampanjo 2000 (Laube), Eŭropa Unio - jes aŭ ne (Gabrielo Nestoro), UK en Adelajdo (Chrdle), Junulara kongreso en Asizo (Bouzek). Enlandan movadon tuŝis prelegoj pri Lančov (D. Kočvara) kaj pri junularo en Ústí (Mikulášek). La junularo eldonis romanon Saturnin de Jirotko tradukitan de J. Vondroušek. Kulmina momento estis transdono de honora kluba prezidanteco al Eva Seemannová por ŝiaj multjaraj

kulturaj kontribuoj al la programo.

La posttagmezan programon spicis spirita koncerto en Ruĝa Preĝejo (Smetana, Händel, Beethoven, Weber, Mozart, Komenský k.a.), vespere gaja koncerto en Kulturdomo. Koncertis B. Šrutová (klarneto), K. Kudlíková, E. Hubáčková, M. Smyčka, J. Endršt, V. Urban (piano) kaj 7-jara Vojta Urban (violono). E. Seemannová deklamis poemojn de J. Karen kaj el tradukoj de M. Lukáš, T. Pumpr, J. Kořínek.

Dimanĉe trarigardo de la urbo Teplice.

### Inundoj en Moravio

Ĉijara somero estis tragedie katastrofa por nia lando, kiam duono de Moravio troviĝis sub akvo, kvindeko da personoj perdis vivon kaj kelkdek mil homoj restis sen tegmento super la kapo. Inter trafitoj estis ankaŭ esperantistoj, kiel dokumentas letero de L. Chytil sendita al la kulturfestivalo en Ústí. Ni citas el ĝi:

*Nia vilaĝo Lověšice estis superakvigita, bedaŭrinde ankaŭ mia domo. En ĝi estis akvo 25 - 50 cm. En vilaĝo estis de akvo ruinigitaj naŭ domo tute kaj kvar detruis tiel, ke ili devos esti ankaŭ nuligitaj. Miaj tapiŝoj ĉiuj estis neniigitaj, same plankoj, mi devas elŝiri eĉ pargetojn. Du tagojn mi tranokti en supra kamero. Dank' al Dio la domo staras. En proksima vilaĝo Troubky estis ruinigitaj de inundo 209 domoj kaj*

*pereis 9 civitanoj. Tio estis natura katastrofo. Al mia amiko esperantisto Antonín Krejčíř en Troubky la akva ondo ruinigis lian domon. La superakvego komenciĝis la 7-an de julio. Přerov estis subakvigita posttagmeze kaj mia vilaĝo je la oka ĝis la deka vespere. Lověšice senkomunikigita 10 tagojn. La akvo kaj pano estis piede transportita trans reloj. La trajnoj kaj aŭtobusoj ne funkciis, ĉar stacioj estis sub akvo. Ankaŭ ne funkciis telefonoj, poŝtoj kaj tiel plu. En urbo kaj vilaĝoj helpis fajrobrigadistoj, soldatoj, policistoj, volontuloj, kuracistoj, geanoj de Ruĝa Kruco ktp. En distrikto Přerov ĝis nun pereis de akvo 13 personoj kaj en norda Moravio 48 personoj. Jen vidu teruran bilancon.*

*Nia E-klubejo ankaŭ estis 30 cm superakvigita. La riveroj Bečva kaj Morava estis tre danĝeraj - sovaĝaj. Nun mi purigas domon de koto kaj komencas sekigi tolaĵojn, sed bedaŭrinde ĉiutage aŭ nokte pluvaĉas. Mi havas malsanan genuon, sed malgraŭ tio mi devas labori.*

*Ludoviko*

## **Alvoko por internacia konkurso pri MODELA ESPERANTO PAROLO**

Ni organizas la 6-an Internacian Konkurson, ĉi-foje por lernejanoj de 11 ĝis 15 jaroj. Per la konkurso ni intencas turni atenton al bela, modela, por ĉiu kiara kaj komprenebla parolo en Esperanto. La plej bonaj konkursantoj estos distingitaj per

honora diplomo IVO LAPENNA. Ĉiu aliĝinto prezentos libere elektitan tekston ne pli longan ol 20 tajpitajn liniojn. La instruisto ĵurios siajn lernantojn kaj sendos la plej talentajn (ne pli ol du personojn) al regiona konkurso, kie la konkursantoj denove prezentos siajn tekstojn kaj tuj poste nekonatan, ricevitan samloke.

La voĉoj estos registritaj en iu sonizola studio kaj la registraĵoj estos ĵuriaitaj de tri kompetentaj personoj apartenantaj al tri diversaj lingvofamilioj. Ĉiu el ili poentos (de 0 ĝis 10) ĉiun registraĵon ne konante la pritaksajn notojn de la ceteraj ĵurianoj.

Ĉe ĵuriado estos konsiderataj:

- a) klara kaj regula prononco de ĉiuj sonoj, silaboj,
- b) ĝustaj akcentado kaj intonado,
- c) ritmo kaj laŭsenca disigo de penselementoj.

Aliĝo ĉe la propra instruisto ĝis la 23-a de decembro 1997.

Loka konkurso: en januaro 1998

Regionaj konkursoj: ĝis la 20-a de februaro 1998.

Atentu: la konkursaĵoj devas atingi la adreson de la organizanto antaŭ la 15-a de marto 1998. Ĵuriado: en marto 1998. Prezento de la distingitoj: ĝis la 15-a de majo 1998

Ĉiuj instruistoj, kies lernantoj deziras partopreni en la konkurso, informu la organizanton, s-ro Ivan Bekavac-Basić ĝis la 6-a de januaro 1998.

ILEI-Komisiono pri Lernejaj Konkursoj prof. Ivasn Bekavac-Basić. Kušlanova 59, HR-10000 Zagreb, Kroatio.

## Kiel al la UK en Montpellier

Post la UK en Prago, kiun amase partoprenis multaj ĉeĥaj esperantistoj (kvankam nur malmultaj povis ĝui ĝin pro amaso da taskoj) sekvis la UK en fora aŭstralia Adelaido, kiun male povis partopreni nur kelkaj el ni. Venontfoje do ni havos ŝancon ĉeesti kiel partoprenantoj - ĝuantoj de la kongreso - la 83-an Universalan kongreson en Eŭropo, sudfranca urbo Montpellier, situanta inter maro kaj montoj. Kio povas esti pli alloga?

**Kiel aliĝi:** laŭ interkonsento kun ĈEA kaj UEA mia entrepreno KAVA-PECH transprenis la peradon de la kongreskotizoj. Tio signifas, ke vi povas pagi al nia konto 555444-051/0100 koncernan kotizon, uzante la „*variabilni symbol*“ 11980801 ne forgesante menciigi vian pagon en la aliĝilo (plenumi la pagon „al la landa peranto“) kaj sendi la aliĝilon ne al UEA, sed al la pli sube menciita adreso de KAVA-PECH.

Atentu! La unua periodo por povi pagi la plej malaltan kotizon validas



nur ĝis la fino de ĉi tiu jaro, ĝis kiam devas veni la mono al nia konto kaj de ĝi per komuna ĝiro al Rotterdam, tial la lasta dato, ĝis kiam vi pagu estu la 15-an de decembro 1997, pli poste vi jam devos pagi la duan (pli altan) aliĝkotizon.

La pli sube indikita kotizo en ĉeĥaj kronoj (aplikante nur la veran kurson de Komerca banko, sen aldono de transĝirkostoj), validas do nur ĝis la 15-a de decembro 1997. Pli malfrua pago signifas ne nur konsideri pli altan kotizon en nederlandaj guldenoj, sed ankaŭ aktualigi la

kurson de Komerca banko, do ni ne ankoraŭ povas difini ĝin. Jen la aliĝkotizoj:

Se vi interesiĝas pri la partopreno de UK, bv. sendi vian interessignon al:

KAVA-PECH, Petro Chrdle,

Anglická 878,

25229 Dobřichovice

Tel.: (02) 9912201,

fax: (02) 9912126,

E-mail: [chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz)

kaj vi ricevos la aliĝilojn kaj pliajn informojn pri la kongreso.

|  |                                   |
|--|-----------------------------------|
| Aliĝkategorio  | Kotizo en<br>Kĉ (ĝis<br>15.12.97) |
| Ne individua membro de UEA                                 | 3672.-                            |
| Individua membro de UEA (en 1997 kaj/aŭ 1998)              | 2945.-                            |
| Kunulo / junulo / handikapulo, ne individua membro de UEA  | 2217.-                            |
| Kunulo / junulo / handikapulo, mem individua membro de UEA | 1472.-                            |

### Kiel veni al la kongreso:

Estas pluraj ebloj, kiel atingi la kongresurbon:

1. Trafikas regula aŭtobuso „Eŭro-lines“ inter Prago kaj Montpellier, la prezo de ambaŭdirekta bileto ĉijare estas 4100.- Kĉ/pers (venontjare povas esti ŝanĝita).

2. Interesatoj pri aŭtobusa karavano (inkluzive tranoktojn) bonvolu kontakti s-inon Jarmila Rýznarová, Na Okrouhliku 21, 530 03 Pardubice

3. Ĉar estas jam kelkaj interesatoj por flugi, ni preparas ankaŭ eblon atingi Montpellier aere. Interesatoj bv. informi nin al la supre menciita adreso de KAVA-PECH, post precizigo de la programo kaj prezo ni informos vin pri detaloj kaj sendos al vi aliĝilon por via eventuala aliĝo.

Petro Chrdle

**XIV-a kongreso de polaj esperantistoj-fervojistoj** okazis (19.-21.9.1997) en Gdansk (urbo de iama misicelo de sankta Adalberto printempe 997). Krom prelegoj realiĝis riĉa kultura kaj turisma programo: religiaj versaĵoj de poeto Leszek Legowski kaj tradukistino Zofia Kamienicka, historia urbocentro. Granda Muelejo kaj Granda Argano ĉe Moldavo, monumento al Defendantoj de Westerplatte, Operejo Leina en Sopot, Paca Kverko (plantita dum UK 1927), kantoj de ensemblo „Gaja Velo“, Oliva Katedralo kun Oliva Orgeno k.a. Nove elektitan estraron envenis kvin virinoj, prezidantino restas Maria Fedorowicz, vp. fariĝis Janina Wereszka kaj sk Barbara Kierejsza.



Jen adreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en la internacia komputila reto Internet (= Interreto), per kiu nia asocio fariĝis unu el 200 milionoj da uzantoj de Interreto en la mondo. Ni povas interŝanĝi rapide poŝtaĵojn kaj informojn kun aliaj asocioj, disvastigadi propagandilojn (jam multaj interretanoj demandis pri Esperanto), lernolibrojn, vortarojn kaj librojn pri kaj en Esperanto. En Oksfordo ekzistas internacia elektronika biblioteko, kiu arkivas elektronike prilaboritajn tekstojn (librojn, gazetojn) en ĉiuj lingvoj, do ankaŭ en Esperanto. Dependas nur de esperantistoj, ĉu la E-fako en la arkivo estos impone riĉa aŭ ridinde modesta. Verŝajne baldaŭ ankaŭ ĉiu familio posedos komputilon aligitan al Interreto (kiel nun televidilon kaj radioaparaton) kaj ĉiu interesato pri Esperanto antaŭ eklermo unue ekzamenos en Interreto, ĉu la E-kulturo estas sufiĉe riĉa, ke ĝi valoru la penon de studado.

### Interredaktore

estas servo de *Eventoj* por kolegoj redaktoroj kolekti informojn pri E-movado. „Interredaktore“ iĝis 1-jara: La interreta kunlabora forumo de E-redaktoroj jam pli ol 1-jaron helpas la membrojn „esti informita“. Alvenas averaĝe 1,5 mesaĝaj artikoloj en 1 tago... En ĉi tiu nmero ni prezentas kelkajn informojn el tiu servo.

### Uzo de la angla kiel instruadlingvo malpermesita en Hongkongo.

Ĝis nun la angla estas instruadlingvo en lernejoj de Hongkongo. Sed, la no-

va Hongkonga registaro sub Ĉinio anoncis 26an de septembro, ke ekde venontjare ĉiuj mezlernejoj, escepte de lernejoj por alilandanoj, devas uzi ĉinan lingvon kiel instruadlingvon. La estro de Eduk-buroo diris, ke tiuj lernejoj, kiuj ne sekvos la ordonon, ne ricevos ŝtatan subvencion, kaj estos punitaj per monopuno aŭ la lernejestroj estos eĉ arestitaj.

Laŭ la ordono, ekde de la venonta jaro, almenaŭ unu modela studsubjekto por studentoj de 12-jaraj aŭ malpli junaj estos instruita en Ĉina lingvo en ĉiu mezlernejo, kaj la deviga studaĵo laŭgrade altiĝos. La registaro ne ŝatis fakton, ke plej multaj mezlernejaj studentoj parolas „Ĉingliš“ (Ĉinese + Engliš).

### La angla unuavice

Konfirmiĝas la ekmalfortiĝo de la franca en la eŭropaj instancoj: la franca versio de la estonta Traktato de Amsterdamo (ratifikota en 15 landoj de la Unuiĝo) alvenis Parizen fine de junio, 10 tagojn post la regantara konferenco, plenplena je eraroj kaj malekzaktaĵoj. „Ĉiukaze, unuavice validas la angla versio de la teksto“, sciigas la bruselaj instancoj.

Ni ne forgesu tion en nia argumentado, same kiel la fuŝan version de la Traktato de Maastricht, kiun oni devis detru. Krome se estas tiom da eraroj en tradukita teksto, ĉu vere necesas havi superan inteligentecon por kompreni, ke samtempa tradukado (interpretado) estas farso? Luj politikistoj volas paroli en la propra lingvo, sed iliaj paroloj estas ne malofte malsamaj laŭ senco, kiam ili eliras el la buŝo la interpretistoj.



## Krucenigmo


**Horizontale:** A. El metalo Sn farita; tavolo/ da nacio; korpopart/o/; B. La unua parto de eldiro de la fama ĉeĥa pedagogo. C. Fariĝ/i/ aspekte pli aĝa; perfektig/i/ per edukado; nefacile ŝanĝbl/a/; kuracajenhava herb/o/. Ĉ. Ĝardena arbofrukt/o/; ar/o/ da estajoj havantaj komunajn ecojn; poseda pronomo; mallongigo de Plena gramatiko; flaveca ĝis ruĝeca tero; nomo de Karenina; task/o/ de aktoro. D. Urbeto en Irano; oleodona arb/o/; simbolo de kriptono; aldon/i/; simbolo sur aviadiloj de Belgio; fari ion el nenio; egala. E. Intence difekt/i/ produktadon; grasa likvaĵo; rilatantaj vidorganojn; ŝnureto; kirurgia kuler/o/. F. Specio de kolomboj; skriblikvaĵo; paŝi en akvo; speco de veturilo; birdo kun granda beko. G. Partoj de dinamomaŝinoj; la dua parto de la eldiro; maninstrument/o/ por preni ŝutajojn. Ĝ. Fondinto de germana aŭtofabriko (kun mallongigo de antaŭnomo unualoke); ornama herbo; eksplodkesto; havi plenan stomakon; arabdevena maŝino por suprenievi akvon.

**Vertikale:** 1. Ofta bird/o/. 2. Antaŭnomo kaj mallongigo de la dua antaŭnomo de la aŭtoro de eldiro. 3. Elig/i/ videblajn radiojn; monaĥejstro. 4. Korpa animala kapabl/o/; montar/o/ en Bulgario. 5. Interna organaro de buĉita besto; batal/i/ en cirko kontraŭ taŭro. 6. Elpensita flugilhava estulo; malpeza boat/o/. 7. Nea konjunkcio; tre mallonga harforma movorgan/et/o/; emfaza adverbo. 8. Reguligil/o/ de elfluo el tubo; doni kontraŭ pago. 9. Ventrodolor/o/; urbeto kaj rivero en GFR. 10. Skriba komuniko; interjekcio pri surprizo. 11. Urbeto en Etiopio; malsekig/i/ per akvoŝprucado. 12. Mallongigo de strato; ne ĉesi senti korinklinon. 13. Monkest/o/; membr/o/ de feŭdotempa metista organizo. 14. Malmola korpoparto; speco de virina vesto. 15. Fortaj mallongaj sonoj; fakt/o/ ke io ne plu estas. 16. Kurba hakarmilo; bezonanta ripozon. 17. Kristmaskvespera arbo; ruĝa radiklegom/o/. 18. Facile cedant/a/; parto de iuj kordinstrumentoj; persona pronomo. 19. Retoteksanta artikulo; muzika son/o/. 20. Impete elspiri per nazo kaj buŝo; ujo en banĉambro. 21. Iu ajn arbitra; dolĉigaĵ/o/. 22. Mallongigo de Organizo internacia de radio-kompanioj; ĝardena arbed/o/. 23. La nomo de

la aŭtoro de eldiro. 24. Lina teksaĵ/o/ (kun artikolo).

**Helpo:** Amik/o/. Ahar; OO. Kuret/o/. Enadoj. Airo; norio. Tore/i/. Cili/o/. Ajut/o/. Oker. Asus. Gaino. Arali/o/.

Adolf Staŭnura



Odesílatel:

Český esperantský svaz  
ESPERANTO, p. s. 1069  
111 21 Praha 1  
**Internet:** cea @ tnet. cz  
☆ **STARTO** ☆

Periodikum Českého esperantského svazu (28. ročník)  
Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno  
Členská evidence a změny adres: Květa Hubnová, ČES Praha

---

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (28-a jarkolekto)  
Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio  
Abonprezo: 15 gld  
Redaktoro: Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno,  
Ĉeĥio  
Presis: OPATISK Opava

---

Podávání novinových zásilek povoleno  
Českou poštou, s.p., Odštěpným závodem Severní Morava,  
č.j. 1533/95-P/1 ze dne 3. 8. 1995

# NOVINOVÁ ZÁSILKA

Poštovné hrazeno v hotovosti  
u pošty 746 01 Opava 1

LORKOVÁ MARTA  
CIHLÁŘSKÁ 16  
602 00 BRNO